

- 26) Lingvaj sonoj (kun—) determinantaj la signifon
- 27) Eksistas „reprezentaj imagoj”, kiuj reprezentas nociojn il ni, kaj „akompanaj imagoj” (komp. B/IV/1): ekzemple, pensante „gepatra domo”, eble aparta ŝtuparejo, kiu iel impresis min, aŭ strangaodoro de la domo, en kiu mi kiel infano loĝis kun miaj gepatroj. (Tiu ĉi lasta ekzemplo jam miksiĝas kun la „akompana sento” aŭ la „sentnuanco”, kiu ofte forte tenas memoron.) — La akompanaj imagoj (kune kun la akompanaj sentoj ankaŭ nomitaj „subsemantikaĵoj”) nur asociite „akompanas”, sed ne reprezentas la esencon aŭ plenan sencon de la vorto aŭ nocio.
- 28) Vere tiu „scio” aŭ „koncio” estas pensfenomeno, ne imago!
- 29) Tiu ĉi ĉapitro pri la reprezentaj imagoj estas prenita el manuskripto de la aŭtoro pri „ĝenerala semantiko”.
- 30) Ekzistas homoj, kiuj preferas vidimagojn, tiaj, kiuj preferas aŭdimagojn kaj tiaj kiuj preferas movimagojn (videca, aŭdeca [akustika] kaj moveca [motora] tipoj). — La tipoj de la pensado dependas de la kapablo abstrakti, rapide trovi interrilatojn (kio verŝajne dependas de la cerbostrukturo), plue de la atentkapablo kaj atento (kiu mem havas diversajn tipojn) ktp.
- 31) Oni parolas pri „signifo de vorto” kaj „senso de frazo”.
- 32) La plej multaj psikologoj distingas tri ŝtupojn de la spirita konsciigo de l' mondo :
 1^e (primara ŝtupo:) perceptoj de la objektoj per la sensoj,
 2^e (sekundara ŝtupo:) imagoj bazitaj sur tiuj perceptoj,
 3^e terciara ŝtupo:) pensoj, baze konsistantaj en interrilatigoj de la imagoj.
- 33) Diagramoj 3 kaj 5 en la artikolo de Eugen Wüster, menciita en noto 4.

332.402'453'577,61

INTERNACIAJ PAGOJ KAJ ORO

(Ernesto Sonnenfeld, Montevideo Urugvajo)*

Jen la unua reeĥo al nia alvoko el n-ro 1 de ĉijara Scienca Revuo — pritrakti science (diversflanke kaj objektivaj) la ekonomiajn kaj financajn problemojn de la nuntempo. Kompreneble la problemoj ne elĉerpiĝas per ĉi tiu artikolo, nek laŭ amplekso de la demandoj nek laŭ diverseco de la opinioj. Ni publikigos ĉiujn science funditajn opiniojn, eĉ se ili ne estas plene neŭtralaj (kiel la ĵus publikigata), ĉar la legantoj vidos la veron nur el la argumentoj ligitaj kun diversaj opinioj.

Por instigi pluan diskuton, en la daŭrigo de ĉi tiu artikolo, ni presigas eltranĉaĵojn el la komentario de la presagentejo Kenter, kiun ili donis tuj post la fino de la lasta dolara krizo. Se iu ne konsentas, bonvolu science kontraŭargumentadi!

Jam dum pluraj jaroj la problemoj de la internacia mon- kaj pag- sistemo, de la dolaro kaj de la oro okupas multajn ekonomikistojn kaj ŝtatestistojn kaj okupos ilin dum pluraj jaroj ankoraŭ. Konata franca spertulo pri financoj laŭdire deklaris, ke oro estas la sola realaĵo en la internacia mon-sistemo. Kion li volis diri per tio? Kion signifas la decido de kelkaj el la plej gravaj mon-emisiaj (centraj) bankoj, per kiu enkondukiĝis duobla merkato por oro: unu por kalkulo interna de la centraj bankoj kaj dua, libera, reganta inter la publiko? Kian futuron oni povas antaŭvidi por la oro kaj por nia ĝisnuna orbazita mon-sistemo? Jen demandoj, kiujn ni provos analizi kaj laŭeble prir respondi.

*) Casilla Coreo 620, MONTEVIDEO

La oro kiel mono estas realaĵo, ĉar dum multaj jarcentoj homoj kutimiĝis al ĝi kaj antaŭ ĉio, ĉar ili havas plejan fidon al ĝia valoro. Ĝi ŝajne ankaŭ havas sufiĉe konstantan valoron, kvankam, se oni analizos tiun ĝeneraligintan kredon, ni vidos, ke temas pri iluzio. La oro havas en nia ekonomia sistemo duoblan rolon: unuflanke ĝi estas produkto kaj komercaĵo kiel iu ajn alia produkto; kiel tia ĝi servas por diversaj celoj industriaj, antaŭ ĉio por dentistoj, ankaŭ por medicinaj preparaĵoj, sed precipe en la oraĵista, do en la juvelista industrio. Duaflanke ĝi estas uzata kiel kovraĵo de la monemisioj. Ekzistas ankoroŭ tria faktoro: la „ortrezorigo (t. e. privata akaparado kaj gardado de oro por investi »daŭrvalore« sian ŝparaĵon). La monkovra funkcio kaj la ortrezorigo interinfluas sin reciproke. Sen orakaparemo la oro ja apenaŭ estus uzata por mon-emisio kaj sen la mona uzado de oro, la or-akaparado estus multe malpli ĝenerala kaj certe ne reprezentus gravan faktoron ekonomian. Komune oni supozas, ke mono, havanta sufiĉe da or-kovraĵo, estas stabila kaj forta (aŭ dura). Tiucele oni fiksis proporciojn inter la valoro de oro kaj tiu de mono, postulante leĝe, ke la koncerna monemisio devas esti kovrita per certa procentaĵo (ekz. 25%) da oro. Ĉe dolaro la valor-rilato al oro estas laŭleĝe po 35 dolaroj por ĉiu unco de fajna oro. Origine la emisiaj bankoj ŝanĝis, je deziro, la monbiletojn kontraŭ la leĝe fiksitaj orkvanto, kaj reciproke donis kontraŭ al ĝi liverita orkvanto respondan kvanton de monbiletoj. Nature la banko bezonis sufiĉan or-kovraĵon, sufiĉan or-stokon por povi ĉiutempe plenumi sian ŝanĝdevon. Evidentas, ke la kvanto mona, povanta cirkuli laŭ tia sistemo, ĉefe dependos de la orkvanto ekstraktebla el la or-minejoj kaj disponebla por mon-emisio. Aliflanke la monon mem oni bezonas por interŝanĝado de produktoj, de varoj. Se la ĝenerala produktado kreskas — kaj ni scias, ke la evoluo de la industrio kaj la kreskanta loĝantaro de nia globo ĉiam pli kaj pli grandigas la volumenon de la produktoj interŝanĝotaj — la monkvanto sufiĉos nur, kondiĉe ke a) ankaŭ pliiĝos proporcie la orkvanto disponebla, aŭ b) malaltiĝas la meza nivelo de la var-prezoj, aŭ c) ekhaltas grandparte la var-interŝanĝado pro estiĝanta ekonomia krizo (plirapidigo de la var-cirkulado povas teorie helpi, se la var-prezoj ne altiĝas samtempe, sed ambaŭ kondiĉoj ĝenerale sin ekskludas).

La oro kaj la ekonomiaj krizoj

Guste en la pasinta kaj en la komenco de la nuna jarcento okazis periode tiaj krizoj ekonomiaj, ĉiam pli akriĝantaj, kiuj, se ni atente studas la historion de la monda ekonomio, plej ofte estis venkitaj dank'al malkovroj de novaj kaj riĉaj or-minejoj (Alasko, Kalifornio, Aŭstralio, ktp.).

La plej forta krizo ekonomia okazis post la unua mondmilito, en la jaroj inter 1929. kaj 1933. Multaj milionoj da laboristoj fariĝis senlaboraj tiam. Por mildigi la konsekvencojn de tiu krizo, Britujo forlasis la klasikan ornormon kiel kovraĵon por pundo, kaj kelkajn jarojn pli poste, Usono fiksis la valoron de oro je 35 dolaroj por unco anstataŭ la antaŭa prezo de 20 dolaroj. Nature preskaŭ ĉiuj aliaj landoj sekvis per similaj aranĝoj. En tiu epoko do, kiam la varprezoj — pro la ekonomia krizo — falis al minimuma nivelo, oni konsiderinde pliatigis la orprezon, por ebligi ekspansion de la monemisiado kaj de la kreditado. Se oro estus simpla varo, kiel ĉiu alia, en krizaj epokoj ĝia prezo devus fali, ne altiĝi, kaj ni vidas do, ke kiam oro formas bazon de mono, ĝia valoro ne dependas de la produktokostoj en minejoj. Se kelkaj ekonomikistoj nuntempe rekomendas plialtigon de la orprezo (oni sugestis ekzemple ke unco devus kosti 70 dolarojn), argumentante, ke ĉiuj aliaj varprezoj ege plialtiĝas kaj tial do la produktado de l'oro ne plu estas sufiĉe profitdona, ili forgesas ja, le) la rilaton de 20 dolaroj ekzistintan en epoko de varprezoj multe pli altaj ol en pli posta periodo, kiam oni altiĝis la orprezon ĝis 35 dolaroj, 2e) ke per plialtigo de la orprezo oni ne kontraŭbatalas la internacian inflacion (kiun oni ja deziras kontraŭbatali), sed kontraŭe oni ebligas pli fortan inflacion, ĉar ĉe pli alta orprezo la emisiaj bankoj rajtas — kaj certgrade estas devigataj emisii pli grandan kvanton da bankbiletoj.

Ni vidas, ke oro, servante kiel bazo de nia monsisistemo, kreas certajn kontraŭdirojn. La respondecaj ekonomiaj kaj politikaj gvidantoj en Okcidento tion iom post iom ekkomprenis, se ne plene, almenaŭ instinktive. Fakte oni forlasis jam post la unua mondmilito la klasikan mekanismon de la or-valutoj: la devon de la emisiaj bankoj ŝanĝi en kiu ajn momento la monbiletojn kontraŭ oro laŭ postulo de la publiko. Nur la emisiaj bankoj inter si egaligis ankoraŭ la diferencojn rezultajn el la var-interŝanĝoj inter iliaj landoj, pere de internaciaj transpagoj de oro. Post la dua mondmilito eĉ tiaj pagoj estis parte forlasitaj kaj oni interkonsentis, ke dolaro kaj pundo estu konsiderataj egalvaloraj al oro. Lasttempe tiu sistemo ekmontris gravajn mankojn unuflanke pro la malfortiĝinta strukturo ekonomia de Britujo, kiu ekŝancelis la pundon nem, kaj aliflanke pro konstantaj deficitoj en la internacia pagbilanco de Usono, kio perdis al Usono grandan parton de ĝia or-stoko. La franca ekonomikisto Jacques Rueff, sutenita depolitikaj gvidantoj francaj konsilis, ke oni internacie fiksu la duobligon de la orprezo, kio ebligus al Usono pagi siajn ŝuldojn kaj tamen konservi sufiĉan orkovraĵon. Francujo, eble anticipante, ke oni devus iri tiun vojon, antaŭe amasigis grandan ortrezoron pere de sinsekvaj pozitivaj pagbilancoj. Sed Usono, helpite de oro da aliaj landoj, elektis alian siste-

mon. Oni kreis duoblan merkaton por oro. La prezo de 35 dolaroj por unco restis por egaligi pagojn inter la emisijaj bankoj kaj ĉi lastaj interkonsentis ne plu vendi oron en la ĝenerala merkato por apogi la oroprezon regantan ĉe la publiko. Tiel do la publiko komercas nun la oron je fluktuantaj prezo, kiel iun ajn alian varon.

Eble estus interese ion spekulii pri la granda danĝero, kiu probable estus minacinta Francujon mem, se la propono de Jacques Rueff estintus akceptita. La aĉetkapablo de la granda ortrezoro akirita de Francujo momente duobligas, kio estus incito por grandskala elspezado — eble en ĉefe prestiĝaj entreprenoj, sed tre verŝajne en entreprenoj supernantaj la veran ekonomian forton de la lando. La natura sekvo estus granda inflacio (la posedo de granda ortrezoro en si mem ne povas eviti inflacion, kiam la ekonomia mekanismo tro hejtiĝas). En Francujo jam ekzistis latentaj fortoj inflaciaj, kiel pruvis la subita eksplodo de strikoj en granda skalo, kiuj malgraŭ la posedado de la ortrezoro, ekŝancelis la stabilecon de franko. Kiom pli grava povus fariĝi la situacio kun la adopto de la proponoj de Rueff!

Kiel plibonigi nunan sistemon?

Ĉu oni devas do kontenti pri la nuna situacio de la internacia mon— kaj pag-sistemo? Certe ne! La kritikoj de J. Rueff kaj de multaj bankistoj kaj ekonomikistoj similideaj, ja ne estas tute senbazaj. Ili eĉ tute pravas pri la mankoj de la nuna sistemo, kiun ili kondamnas; ni kritikis nur la rimedojn proponitajn. Ĉefa manko de la nuna sistemo estas, ke ne ekzistas efika kaj aŭtomata bremsado por inflaciaj fortoj. La mono kreiĝas pere de kreditoj por produktataj kaj vendataj varoj. Sed kiam la bankoj donas kreditojn, ili ne esploras la prezojn fiksitajn en la vendkontraktoj. Ĝeneralajn prezaltiĝojn oni rimarkas nur pli poste kaj tiam oni bremsas — jam ion malfrue — per kreditrestriktado. La oro, kvazaŭ aŭtomata regulilo, tamen ne povas helpi, ĝi povas nur kaŭzi pli bruskaĵajn saltojn, t. e. pli vehemencajn krizojn.

Kiajn eblojn ni do vidas por plibonigi la nunan sistemon? La mono devas esti, jes, plejeble stabila. Por tio necasas havi veran mezuron de ĝia valoro. La oro estas netaŭga ilo por tio. Estas iluzio, ke ĝi refunkcios kiel ankoraŭ antaŭ sesdek jaroj. Kio do difinas vere valoron de mono? La meza nivelo de la necesaj vivrimedoj, la prezoj de la ĉiutage konsumataj nutraĵoj, de la hejtiloj, bruligaĵoj, krudmaterialoj kaj de aliaj vivnecesaĵoj. Ĉu ni povus bazi monon sur tiaj varoj? Parte jes, kvankam komence la organizado estus iom malfacila. Ni skizis tian

eblon. La interŝanĝado ed la varoj inter la nacioj baziĝas ĉefe sur a) nutraĵoj (tritiko, rizo, maizo, sukero, kafo, kakao, kokoso, vegetalaj oleoj), b) krudmaterialoj kaj duone ellaboritaj produktoj (petrolo, kotonno, lano, celulozo, paperpulp, ercoj, fero, ŝtalo, kupro, stano, nikelo, ligno, kaŭĉuko, ktp.), c) finitaj produktoj (nuntempe ĉefe maŝinoj, fabrik-instalaĵoj). La grupo c) ne povas servi kiel bazo por mono, ĉar le) ĝi estas tro diversa kaj kontante transformiĝanta, t. e. la produktoj rapide malmoderniĝas, 2e) la prezoj de tiuj produktoj ĉiam pli altiĝas, parte pro tio, ke ili ĉiam pli komplikiĝas kaj ke salajroj pagataj en tiu evoluinta industrio konstante altiĝas. Do povas servi kiel bazo produktoj menciitaj sub a) kaj b). Ili posedas avantaĝon, ke ili, laŭ la nuntempaj metodoj, estas relative longtempe stokeblaj, facile anstataŭeblaj ĉiujare per samaj produktoj de nova rikolto aŭ similaj produktoj laŭ iom-post-ioma modifiĝoj de la konsumo. Ekz. se la tendenco estas konsumi pli da kakao, tion oni facile povas reguli per internacia interkonsento, same, kiam kreskas ekz. la konsumo de sojo, dum — ni diru — malkreskas tiu de aveno aŭ de sukero. La mono povus do baziĝi sur tuta aro da tiaj produktoj, en ekvilibra proporcio unu rilate al la alia. Tiu proporcio fiksiĝus laŭ la statistikaj ciferoj de la monda interŝanĝado dum la kvin lastaj jaroj. Ĉiu lando ricevus kvoton da tiaj produktoj, kiun ĝi stokus en stokejo de la Tutmonda Mon-Fonduso, kontraŭ kiu ĝi povus ĝiri sur la Fonduson, ricevante mond-monon garantiitan pere de la stokoj de ĉiuj membro-ŝtatoj. Oni akceptus kelkprocenton pli ol la antaŭe fiksitaj proporcio. Tia super-liverado aŭtomate reklifiĝus, se la plimulto de la membro-ŝtatoj super-liverus stokojn, kaj tiamaniere la sistemo fariĝus elasta, permesanta ĝeneralan super-produktadon, kiu tamen ne provokus krizon. Kontraŭe, kiam iu ŝtato suferus pro momenta misrikolto, ĝi povus pruntepreni certan kvanton el la stoko de la Fonduso, pagante malaltan interezon. Kiam dum la kuranta jaro oni eksportas la produktojn, oni ilin prenos el la stoko fondusa, emisiante ŝuldatestojn, pagante nenian interezon ĝis la proksima rikolto, kiam oni devos anstataŭi la produktojn el la nova rikolto. Aranĝo de speciala prunto interezdeva komonciĝus post tiu dato. — Nature ĉio ĉi postulus multe da teknikaj aranĝoj, da interkonsentoj, da administrado kaj da prizorgado, sed tio ankaŭ normale estas necesa por diversaj produktoj de la internacia var — interŝanĝado. La diferenco estus nur, ke tio okazus nun en la kadro de internacia mon-emisio. Aliflanke la avantaĝoj estas klaraj: a) relativa konstanteco de la mon-valoro, b) kontentigo de la postuloj de la evolu-landoj, kiuj tiamaniere akiros konstantajn valorojn por siaj produktoj, c) internacia stakado de la kvant-produktoj kaj materialoj, kio kaŭzus ekonomian plibonigon de la produktantoj de tiuj varoj.

LA KAUKOJ POR LA DOLARA KRIZO

Estororda, urĝa, kunveno de internaciaj bankistoj en Vaŝingtono ne povis solvi esencajn problemojn de la krizo. Ilia celo estis nur forigo de la simptomoj — ke oni provu bremsi fortan spekulacian aĉetadon de oro kaj tiel ricevi la tempon necesan por trovi kaj apliki esencajn solvojn.

La esenco de la problemo estas forfluado de dolaroj, premanta Usonon jam de 1950. kaj nun ankoraŭ plifortigita per necerteco de ekonomiaj perspektivoj kaj de la milito en Vjetnamio.

Antaŭ ol Usono ekhavis la deficiton en sia pagbilanco, havigado de oro okazadis regule kaj ĉiam pli grandkvante, ĉar aliaj landoj pagadis al la usona Ministerio por financoj per oro, plenumante siajn financajn devojn aŭ partopagante siajn ŝuldojn.

La orstoko de Usono atingis la rekordan sumon en 1949, kiam ĝi estis 24,5 miliardoj da dolaroj, kio signifis pli ol duono de la tuta orprodukto en la landoj de la kapitalisma mondo. La forfluado de dolaroj komenciĝis en 1950., kiam Usono havis en sia pagbilanco la deficiton de 3,5 miliardoj da dolaroj. Ekskludante 1957 /kiam la krizo pri Suez helpis Usonon kaj ebligis eĉ la suficiton en la pagbilanco — 578 milionoj/, la forfluado de dolaroj moviĝis inter 8 milionoj en 1951. kaj 3,9 miliardoj en 1960. La orstoko de Usono falis tiel je duono, t. e. je 12 miliardoj kaj la malaltiĝo ankoraŭ daŭras. Tamen, malgraŭ ĉio, la orstoko de Usono estas ankoraŭ plej granda inter ĉiuj ŝtatoj en la mondo.

Kiam unu spekulacia aĉetado de oro kaŭzigis plialtigon de orprezo en la Londona Borso je pli ol 40 dolaroj por unco, en 1960., alvenis kreo de »Londona orborso«, en kiun membriĝis 8 ŝtatoj pretaj havigadi al la merkato sufiĉe da oro por respondadi al la bezonoj kaj haltigadi la prezon ĉe 35 dolaroj por unco.

Kiam la internacia orborso havigas iun orkvanton — kiel okazadis pasintjare — la landoj-membroj dividas ĝin laŭ la kvotoj per kiuj ili partoprenas la orborson. Usono transprenis la parton de Francio, kiam ĝi forlasis la orborson, kaj tiel Usono devigis sin kovradi stokojn de la orborso per 59%. Tial ĉiu vendado de oro al privatuloj pere de la

Londona Borso, trafus plej multe Usonon. Aliaj orborsoj en Eŭropo havigas oron al si per la Londona Borso. Subita plialtiĝo de la aĉetado en la pasinta printempo /arabo-israela konflikto/ iom malaltigis la orstokon de Usono, sed la plej forta bato venis post devalorigo de la angla pundo la 18-an de novembro pasintjare.

Pro tia stato en la ormerkato, la papermona — eĉ dolaro — fariĝis duba kaj multaj rapidis aĉetadi oron, kiun ili trovis pli certa kaj nedevalorigebla, kiel okazas kun la papervalutoj. La internacia orborso eltenis du tiajn atakojn — unu post la devalorigo de pundo kaj la alia en decembro pasintjare — simple pro deklaro resti firme ĉe la orprezo de 35 dolaroj por unco. Sed necerteco kaj timo estis tro grandaj. Kreiĝis kredo, ankoraŭ ne forigita, ke fine tamen venos plialtigo de la orprezo, kio ebligus grandajn profitojn al aĉetintoj de oro je la prezo de 35 dolaroj. Oficialaj reprezentantoj de Usono nomis tian kredon absurda.

Ekzistis iu necerteco rilate la konvinkon ĉu Usono kaj Britujo sukcesos en siaj financaj planoj kaj ĉu ili forigos siajn pagbilancajn deficitajn. La konstanta buĝeta defcito en Usono kaj rifuzado de la Kongreso konsenti kun la propono plialtigi la impostojn je profitoj, plizorgigis eŭropanojn kaj aliajn kompanianojn de Usono kaj tiel ankoraŭ pligrandigis la timojn pro nestabileco. Multaj opiniis ke la aĉetado de oro estas la plej bona vojo por eviti la sekvojn de la nestabila financa situacio en la mondo, kvankam per tia aĉetado oni ne povas akiri la interezon, kontraŭe oni devas ofte pagadi la asekuraĵojn kaj elspezadi por trezorigo de la oro.

Pro tio, kamence de ĉi tiu jaro, la usona registaro komunikis la programon pri kontrolo de investado, plialtigo de eksporto, pri eblaj importaj impostoj, impostoj por turismaj vajaĝoj kaj denove postulis akcepton de la leĝpropono pri plialtigo de la impostoj je profitoj; per tiu vojo ĝi provis malgrandigi la forfluadon de dolaraj dum ĉi tiu jaro por ĉ. 3 miliardoj (Pasintjare Usono perdis 3,57 miliardojn). Sed intertempe la usona registaro pritraktis ankaŭ la eblan eskaligon en Vjetnamio, resp. plinombrigon de soldatoj en Vjetnamio, kio nur pli molbonigus la situacion kiu ekestis pro la enorma forfluado de dolaroj el Usono.

La Administracio por la federaciaj rezervoj de Usono plialtigis la eskonton de 4,5 al 5 procentoj /kio signifas la plej altan eskonton

en la pasintaj 40 jaroj/, provante limigi la inflacion kaj plifortigi dolaron. Ĉi tiu paŝo de la administracio fakte signifis plian malbonigon de la kondiĉoj por ricevi kreditojn kaj plialtigon de la interezoj. Post tio la usona Senato finakceptis la proponon pri ĉesigo de la orkovrado de dolaro en la interna uzo. Per tio la tuta sumo de la orstoko, entute 11,4 miliardoj da dolaroj, estis disponigita al la usona registaro por respondadi al siaj devoj koncerne fremdajn ŝtatojn kaj fremdajn ŝtatojn.

Sen ia ajn dubo la orfeproj el 1967. kaj 1968. alvenigis la krizon en internacia financado. La postsekvojn de la krizo oni sentados ankoraŭ dum monatoj, eble dum jaroj. Ĝi alvenis en la tempo kiam kapitalismaj landoj ellaboradis planon por kreo de unu nova speco de mono, ne baziĝonta je oro. Akceptita en septembro pasintjare, dum la kunveno de la internacia valutfonduso en Rio de Janeiro, ĉi tiu nova plano /nomita „sistemo de specialaj rajtoj por tiri la krediton“/ havus simple formon de kontumado de la spezoj de unuopaj membro-ŝtatoj en libro de la Internacia Valutfonduso.

Por realigi ĉi tiun planon kaj doni la devigforton al ĝi, necesas ke unuopaj ŝtatoj el la Internacia Valutfonduso antaŭe ratifu ĝin, kondiĉe ke minimume 85% de la membro-ŝtatoj voĉdonu por ĝi.....

/Tradukis B. Popović/

661.723:547.22:541.56

PARTAJ ŜARGOJ KAJ REDOKSA KARAKTERIZAĴO DE ATOMOJ EN HALOGENMETANOJ.

(B. V. Tokarev, Moskvo, Sovetunio).

Ĉi tiu studo estas dediĉita al serĉado de reduktio-oksidge (redoksa) karakterizaĵo de atomoj en organikaj kombinaĵoj^{1,2,3,4} konsiderante, ke tiu karakterizaĵo devas esti aplikebla ankaŭ al neorganikaj substancoj. Evidente, al ĉiu ĥemia ligilo de atomo devas respondi plus (+) aŭ minus (—) unuo, kiel ĝia diskreta karakterizaĵo (komparu³); la signo ne devas dependi de tipo de ligilo (jona aŭ kovalenta), ĉar disocio kaj asociigo de jonoj ne estas redoksaj procedoj. Tial restas sola eblo por difini tiun karakterizaĵon, nome, por atomo A la signo devas koincidi kun signo de diferenco inter efikaj ŝargoj δ de atomoj inter si ligitaj. La efika ŝargo egalas al sumo de entjera ŝargo (i), aperanta dum formiĝo de jonaj kaj don-akceptaj ligiloj, kaj de partaj ŝargoj (ϵ), estiĝantaj pro polariziĝo de kovalentaj ligiloj.

Sumigo je ĉiuj atomoj B, ligitaj kun A, donas la serĉatan karakterizaĵon (relativan valenton) de atomo A:

$$R = \sum \rho \frac{\delta_A - \delta_B}{|\delta_A - \delta_B|} ; \text{ se } \delta_A = \delta_B, \frac{\delta_A - \delta_B}{\delta_A - \delta_B} = 0 \quad (1)$$

kie ρ — estas obleco de ligilo; don-akcepta ligilo estas konsiderata kiel kombino de la kovalenta kaj la jona, tial ĝia obleco estas $\rho = 2$; en la rektaj krampoj estas absoluta amplekso.

Elektro de direkto de polariziĝo de kovalenta ligilo, kiel kriterio por difino de R, kondukas al kontraŭdiro kun la maniero de karakterizaĵo de redoksa stato en neorganika ĥemio, ĉar en jonoj NO_2^- , NO_3^- , ClO_2^- , ClO_4^- , BrO_3^- , BrO_4^- (rig. tabelon N^o 1) la ligiloj ŝajnas esti polarizitaj de oksigenaj atomoj al la centraj, sed malgraŭ tio ni devas atri-